

JULIO BAGHY

Dum la legado de iuj verkoj de Julio Baghy mi havis okazon atingi la konadon de tiu verkisto, de lia personeco kaj de lia graveco por la esperanta literaturo, kies unu el la protagonistoj li estis.

Iniciatinto kune kun Kàlman Kalocsaj de la Budapeŝta skolo, Julio Baghy estis ankaŭ fervora propagandisto kaj instruisto en la esperanta movado kaj eminenta verkisto.

Li ŝatis la dramverkadon, ĉar li sentis ke, per tiu artspeco, li povis vibrigi la plej profundajn sentojn, komunajn al ĉiuj homoj, kulturitaj kaj ne. Li bone konis la homojn kaj iliajn tristajn travivaĵojn ĉar li vivis ses jarojn en Siberio kiel militkaptito. El tiu sperto li verkis la unuan aŭtobiografian romanon "Viktimoj" kiun sekvis, poste, la daŭrigo "Sur sanga tero".

En tiuj verkoj li ne perfidas siajn kvalitojn de aktoro kaj reĝisoro.

Li priskribas, zorgeme, lokojn kaj mediojn, dismetante, arte, lumojn kaj ombrojn, kiel scenaristo sur teatra scenejo. Tie enviciĝas diversaj personoj, ĉiu kun propra historio; epizodoj vere vivintaj, kelkfoje nekredeble kruelaj, kiujn, tamen, la aŭtoro malpezigas, enkondukante mokemajn figurojn, kvazaŭ li ne volus timidi la leganton-spektanton.

Tiuj ĉefverkoj evidentigas lian senton de homamo kaj bonvolemo al ĉiuj, lian romantikan kaj mildan karakteron, lian personan ĉarmon.

Baghy, dum sia kaptiteco, ekhavis propran religian kredon. Laŭ li, Dio estas vivo, kaŝita en la harmoniaj naturaj leĝoj, vivo kiu kreas, konstante, kaj donas al la homo la plej purajn sentojn, devigante lin al daŭra kunlaborado. Pro tio Baghy apartenas al tiuj raraj homoj kiuj konservas flaman junecon.

Li manifestas tion en sia dramo: "Sonĝe sub pomarbo" kiu estis ankaŭ la lasta dramo de lia vivo. Liaj versoj fluas kvazaŭ lulaj melodioj, kvazaŭ koversacia prozo. Li prezentas bildon de juna amo, kiu daŭras ekde niaj gepatroj Adamo kaj Eva, renovigita tra la tempo.

La poeto kantas la ĉiaman aman senton de la homo, dum samtempe, li rigardas rekte en la vizaĝon de la morto.

VIKTIMOJ.

Tiu-ĉi romano estas biografia priskribo pri eventoj okazintaj en Siberia koncentrejo dum la unua mondmilito. En barakaro amasiĝas politikmilitkaptitoj, senpovaj kaj sendefendaj viktimoj kies espero estas nur transvivi.

Eĉ la potenculoj estas viktimoj de propra ambicio. La estro de koncentrejo, ekzemple, la tiel nomata "tigro", pro sia krueleco, similas ferocan sovaĝbeston. Li ĝuas subpremante dignon kaj personecon de la mizeraj kaptitoj. Lia voĉtono estas ordono, lia agado estas torturi, lia ilo estas vergo. Kiam amaso da ribeluloj alproksimiĝas al la koncentrejo, li rapide forkuras kunportante edzinon kaj fileton. Dum la forkuro la infaneto falas de la veturilo sed la tigro ordonas la daŭrigon de vojaĝo, nezorgante pri la senesperaj kriegoj de la edzino. Tamen li ne sukcesas sin savi. Lia mortigo estas liberigo por la subprematoj kaj trankvileco por la edzino kiu povas, fine, ĝui la amon de la retrovita fileto kiun ŝi konsideris jam malaperinta.

Alia potenculo: la Prokuratoro, edziĝis kun Katia, belega, ĉarma, je ranga familio. Li ne amas ŝin. De tiu geedziĝo li eltiris profiton al sia kariero. Ne ĝenas lin la fakto ke Moŝtuloj amindumas kun lia edzino, male, li klopodas por faciligi tiajn renkontiĝojn ĉar tio favoras lian socian pozicion.

Katia, senpova, obeas kaj plenumas lian deziron ĉar ŝi opinias ke tiu estu sia devo. Ŝi renkontiĝas kun Johano, la artisto, kun kiu ŝi estas pretiganta teatran spektaklon. Ŝi tuj

rimarkas ke li ne similas la aliajn virojn ĝis tiam konatajn. Tamen ŝi volus, kiel kutime, ludi kun li sian rolon de amatino. Johano nepre refuzas. Li amas sian edzinon, kiu atendas lin en sia malproksima lando. Laŭ Johano amo estas sublima sento kiu postulas konstantajn dediĉon kaj fidelemon. Katia, iom post iom, sentas intime revekiĝi amkapablo kaj morala sento. Ŝi enamiĝas al Johano, kvankam li ne reciprokas. Ŝia konduto sanĝiĝas. Ŝi ekribelas kontraŭ la edzo, kiu koleriĝas ĉar la afero malutilas al li. Pro venĝo li forsendas Johanon, per la trajno de la morto, al loko de kie eble oni ne povas reveni. Katia falas, pro eraro, per mortiga frapo. La prokuratoro, antaŭ ŝia senmova korpo, fin fine esploras kaj lia rimorso forviŝas ĉiun deziron de venĝo.

Johano ekscias ke sia edzino trompas lin. Konsternite pro tio kaj pro la morto de Katia, li preferas alfronti la trajnon de morto por ke la fizikaj suferoj mildigu tiujn moralajn.

La plej kortuŝa persono de la romano estas Fiza. Ŝi naskiĝis en misera multnombra familio. Apenaŭ dektrijara ŝi estis devigata aliri al la koncentrejo por havigi iom da manĝaĵo al si kaj al siaj gefratetoj. La kaptitoj, jam fariĝintaj sovaĝbestoj, postulis de ŝi interŝanĝon, kiun la misera knabino ne povis refuzi. Tiel Fiza fariĝis iom post iom amludiloj por ĉiuj. Neniu amis kaj amas ŝin. Tamen Fiza kaŝas en sia koro fortan amsenton, kiun ŝi dezirus doni al iu, sed neniu petas ĝin. Kiam okaze, oni konfidas al ŝi la infanon de la "Tigro", ŝi sentas sin renaskiĝi, sed tiu ĝojo daŭras mallonge. Ŝi amas Johano ĉar li estas la nura persono kiu konsideras ŝin "homa kreitaĵo". Sed ŝi ne povas malkaŝi al li tiun sekreton por ne ĉagreni lin. Tamen, kiam ŝi ekscias ke oni persekutas lin, ŝi kuras al la stacidomo por dividi kun li la suferojn sur la trajno de la morto. Sed Fiza alvenas tien tro malfrue tiel ke ankaŭ ŝia lasta espero mortas.

Por la viktimoj de tia katastrofo la justa revalorigo estas reakirebla nur per kompato, amo, doloro kaj rimorso.

SUR SANGA TERO.

Milito kaj revolucio detruis urbojn kaj strekis neforviŝeblajn sulkojn sur la vizaĝojn kaj en la korojn de la homoj.

Nun, sur sangaj ruinoj ili devos rekonstrui novajn urbojn kaj domojn taŭgeblajn por la estiĝonta societo.

La revolucio forportis centjarajn kutimojn kaj tradiciojn, renversis sociajn klasojn, stimulis la animojn al delonge deziritaj libereco, egaleco, justeco.

En la armeo la oficiro, antaŭe trouzis sia povon per vergo, perforto, sadismaj kruelaĵoj kontraŭ la politik-militkaptitoj. Nun li fariĝas homo, kaŝanta malantaŭ senemocia mieno, la suferon pro tro da vane verŝita sango, la angoron pri estonto, la nostalgion pri la malproksima familio, tio estas, la samajn sentojn de la kaptitoj al li konfidataj. Eĉ antaŭ ol fariĝi politike "kamarado", li montras sin ilia frato. Estonte, kiam la situacio renversiĝos, oni reciprokos al li tian senton.

La virino eliras el sia rolo de objekto utila al homo kun la nura tasko provizi la hejmon kaj naski filojn. La eventoj postlasis ŝin sola por sin defendi, provizi, per propraj fortoj, sin mem kaj siajn filojn, je ĉio necesa. Nun ŝi akiras personecon kaj aŭtonomion. Ŝi laboras en fabriko, instruas, malfermas metiistan laborejon, sin vestas per milita aŭ partizana uniformo, aŭ rezignas la amon por ne trompi sian politikan idealon.

Fin fine nun la homo rajtas vivi libere, en paco.

Sed tiu, kiu revenas al sia urbo post longa foresto, povas trovi la domon detruita, la familion disperdita, la gepatrojn forpasitaj. Li iradas tra ruinoj, inter lacaj, necertaj homoj, vagantaj, kiel li, sencele.

Tiu urbo, kie li naskiĝis kaj travivis, nun aperas antaŭ liaj okuloj kiel nova Siberio, kiel avida sovaĝbesto jam preta por lin formanĝi. Li komprenas ke por ĉiuj revenantoj, kiuj memoras la malnovan aspekton de la urbo, estos tre malfacile lukti, suferi kaj iluziiĝi pri retrovebla paco ĉar ĝi eble ne ekzistas.